Karavane tra Rusio

En la komencaj tagoj de januaro 2006 dum Internacia Festivalo en Trier mi prelegis pri mia vojaĝo al Ĉinio. Ĝi estis trajna vojaĝo tra Siberio, kiun faris mi kaj mia filino por atingi Pekinon, la ĉefurbon de Ĉinio, kie okazis la Universala Kongreso en 2004.

Ĉiam, kiam mi lanĉas iun malproksiman vojaĝon, mi komencas cerbumi pri ĝia allogo kaj ĝia intereso, ĝia neceso kaj ĝia utilo. Certe mi pripensas ankaŭ

Antaŭ la forveturo en Moskvo: Fotado kun „Lenin" kaj aliaj konataj personoj de la rusa kaj sovetia historioj.

pri sufiĉaj tempo kaj mono por ĝi. Kiam vojaĝplano iom preciziĝas, ĝuste tiam ektumultas enkape la kantvortoj, kaj mi ĝoje kaj fervore murmuras: „Ni vojaĝas, ni serĉas ion, malproksimo logas nin ...". Ĉu vere vojaĝoj estas tiom allogaj? Ĉu estas ia vivoĝojo en ili? Ĉu ne nervozigas min frapoj de ferradoj? Certe, mi ŝatas vojaĝi pertrajne tra vastaĵoj de nia lando, admirante ĝiajn pejzaĝojn, legante libron aŭ satdormante, aŭ parolante kun novaj kunvojaĝantoj. Frapoj de vagonradoj ordigas mian pensmanieron ... .

Kelkaj el la ĉeestantoj de mia prelego dum Internacia Festivalo iniciatis organizi komunan vojaĝon tra Rusio survoje al UK en Japanio 2007 ... . Tiel komenciĝis preparado al transsiberiumado. Duonjaron antaŭ la Universala Kongreso formiĝis 20-persona grupo de 22- ĝis 77-jaraj geesperantistoj el Francio, Nederlando, Italio kaj Svislando. La Esperanto-karavano kunvenis en Moskvo. 3-taga restado en ĝi permesis konatiĝi kun vidindaĵoj de la ĉefurbo, ŝipumi laŭ Moskva-rivero. Dum unu el la vesperoj ni spektis la baletan spektaklon „La Cigna Lago" de P. Ĉajkovskij. Kelkaj lokaj geesperantistoj afable ĉiĉeronis.

La trajnvojaĝo ĝis Irkutsk (pli ol 5000 km) daŭris 3,5 tagojn kaj estis plena de novaj impresoj por Esperanto-karavananoj. Ni preterveturis grandajn urbojn kaj riveregojn, vastajn kampojn kaj densajn arbarojn. Duonhora halto en urbo Krasnojarsk estis dediĉita al renkonto kun lokaj geesperantistoj.



Kupeo en trajno de la Transsiberia Fervojo.

En Irkutsk komforta buso kun klimatizilo veturigis nin tra la urbo, kaj loka ĉiĉeronino fervore rakontis pri ĝiaj historiaj kaj kulturaj heredaĵoj. Admiris ni la Bajkal-lagon, ĝian grandecon, purecon de ĝia akvo. Malgraŭ iom malvarma akvo troviĝis en nia grupo kelkaj kuraĝuloj por naĝi. La laga fiŝo „omul" bongustegis en diversaj pladoj dum nia restado en la regiono.

Pliajn kilometrojn ĝis Vladivostoko (4110 km) niaj grupanoj, jam interamikiĝinte kaj harmonie kunvivante pokvarope en kupeoj, sentis sin spertuloj pri longdaŭraj vojaĝoj. En la dispono de ĉiuj vojaĝantoj en rusiaj trajnoj konstante estas senpaga boligita varma kaj malvarma akvo. Vagonaj svardist(in)oj, kiuj dum la tuta vojaĝo akompanas ajnan vagonon, dejorante alterne, vendas al pasaĝeroj ankaŭ kafon kaj teon en specialaj glasoj kaj iujn akompanajn manĝetojn. La prezo estas agrable surpriza! Dum longaj haltoj – po 20-30 minutoj – laŭplaĉe aŭ laŭbezone eblis aĉeti certajn manĝojn en butikoj surperone. Kaj eblis tutcerte tag- aŭ vespermanĝi en vagona restoracio.

En Vladivostoko geesperantistoj varme renkontis la Esperanto-grupon. Kortuŝa akcepto kaj komuna fotado, ekskursoj tra la urbo kaj ekster ĝi, partopreno en la urba festo de mara floto kaj festa piroteknikaĵo, vizito al urba muzeo kaj vesperaj promenoj estis neforgeseblaj.

Pejzaĝo en Siberio.

Fine de julio ni ekiris ŝipe al Japanio ... .

Finiĝis la aventura vojaĝo al „ekstremo" de la mondo. Neniu el ni havis gravajn sanproblemojn kaj la tuta vojaĝo pasis sen iu ajn serioza akcidento. La grupo spertis multon nekutiman kaj novan kaj ekestis la deziro vidi Rusion en sia diverseco. La plej plezuriga estis bonega etoso en nia grupo, kiun kreis ni ĉiuj!

En Germanio, Svislando kaj Aŭstrio informojn pri organizota Esperanto-

karavano tra Rusio al la 6a Azia Esperanto-Kongreso en Ulan-Batoro/Mongolio junio 2010 peras Rosa Ebel (eweri(ĉc)t-online.de aŭ telefono 0163/5577177)

Tatjana Loskutova